

Svisa Esperanto-Societo

informas

jaro 2013 numero 4-a: novembro-decembro 2013
dissendo je la 1-a de novembro



Fotis Claude Gacond

Ĝua promeno kiam la naturo rebuntas !

Pri la sukcesa SFERO en Langnau raportas la paĝoj 5-7aj.



Fotis Dieter Weidmann.

Vera Pochanke kaj Murielle Burgbacher gvidas la manlaborojn de la infanoj.



Fotis Dieter Weidmann

Promenadas Nelida Weidmann, Dieter Rooke, Danielle Carrier, Julia Noe el Germanio, Luc Allemand, Marion Bélisle kaj Emmanuel Desbrières el Francio.



Svisa kalendaro

Ankaŭ vizitu la retan version de la kalendaro prizorgata de Luko Allemand
www.svisa-esperanto-societo.ch/kalendaro

Novembre

- 4 : **Lausanne** : LES-kunveno kun Charlotte Bl.
- 9 : **Genève** : Stelanoj vizitas *La Grande Ourse*.
- 9-10 : **Broc** : Stando en kongreso pri pacedukado.
- 14 : **Basel** : ESB-kunveno.
- 16 : **Chaux-de-Fonds** : CDELI-Studsabato.
- 24 : **Etoy** : Kunvenas la Svisa Koruso.
- 25 : **Lausanne** : La Svisa Koruso festas L. Dovat.

Decembre

- 12 : **Basel** : ESB : Zamenhofa festo en Francio.
- 14 : **Chaux-de-Fonds** : CDELI-Festa Studsabato.
- 14 : **Lausanne** : LES: Zamenhofa Festo.
- 15 : **Redakta datlimo de SES informas.**
- 15 : **Etoy** : Kunvenas la Svisa Koruso.
- 27 ĝis 2014.01.03 : **Saarbrücken**: Novjara Renkonto.
- 29 ĝis 2014.01.04: **Kotonuo**: Afrika Kongreso.

Januare 2014

- 6 : **Lausanne** : LES-kunveno.
- 18 : **Chaux-de-Fonds** : CDELI-Studsabato.
- 25 : **Etoy** : Kunvenas la Svisa Koruso.

Februare

- 3 : **Lausanne** : LES Ĝenerala Asembleo.
- 10 : **Redakta datlimo de SES informas.**
- 15 : **Chaux-de-Fonds** : CDELI-Studsabato.
- 23 : **Etoy** : Kunvenas la Svisa Koruso.

Marte

- 3 : **Lausanne** : LES-kunveno.
- 15 : **Chaux-de-Fonds** : CDELI-Studsabato.
- 23 : **Etoy** : Kunvenas la Svisa Koruso.

Aprile

- 7 : **Lausanne** : LES-kunveno.
- 26 : **Chaux-de-Fonds** : CDELI-Studsabato..

Maje

- 17 : **Chaux-de-Fonds** : CDELI-Studsabato.
- 18 : **Yverdon** : SES-Ĝenerala Asembleo.

Junie

- 21 : **Chaux-de-Fonds** : CDELI-Studsabato.

Julie

- 1 : **Redakta datlimo de SES informas.**

Organizantoj de kursoj kaj stud-kunvenoj

- Basel** : Esperanto-Societo Basel : PF 178, 4005 Basel, tel : 0049 76 214 57 12.
- La Chaux-de-Fonds** : CDELI, Bibliothèque de la Ville, strato Progrès 33, CP 3034, 2303 La Chaux-de-Fonds. claudEGAcond@ne.ch, tel : 032 967 68 42.
- CDELI-Studsabatoj** : Aliĝo ĝis la mardo antaŭ la koncerna studsabato ĉe Nancy Fontannaz : Rete: nancy.fontannaz@gmail.com, tel : 021 728 31 27.
- Lausanne** : Laŭzana Esperanto-Societo : CP 246, 1000 Lausanne 22. www.esperanto-lausanne.ch tel : 021 647 29 28. www.eo-l.ch .
- Genève** : Grupo La Stelo : CP 734, 1212 Grand-Lancy 1, tel : 022 771 24 37.
- kaj Asocio Esperanto-Genève-Régions** : esperantoegr@gmail.com
- Wil** : Esperanto-Klubo : <http://esperanto.ch/wil>.

Rememorigilo

SES informas

Redakcio :

Claude Gacond, Str. Chevreuils 14,
CH-2300 La Chaux-de-Fonds
Retpoŝto : gacond@bluewin.ch
Tel. : hejme: 032 926 52 32
ĉe CDELI : 032 967 68 42

Redaktaj kunlaborantoj:
Nancy Fontannaz, Stefano Keller,
Richard Schneller.

Redaktaj datlimoj

2014-1 : januaro-februaro :
decembre 15, dissendo 10-an de januaro.
2014-2 : marto-junio :
febuare 10, dissendo 1-an de marto.
2014-3 : julio-oktobro :
julie 1, dissendo 15-an de aŭgusto.
2014-4 : novembro-decembro :
oktobre 10, dissendo 1-an de novembro.

Kotizoj al SES

Kun ricevado de *SES informas*

Fr. 10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
Fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
Fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
Fr. 50	Paroj	ekde 30 jaroj
Fr. 70	Patronoj	ekde 30 jaroj
Fr. 25	nura abono al <i>SES informas</i>	

SES-estraro

Mireille Grosjean, kunprezidanto, Grand-Rue
9, 2416 Les Brenets. Tel.: 032 932 18 88 kaj
079 69 709 66.

Retpoŝto : mirejo.mireille@gmail.com

Dietrich Weidmann, kunprezidanto, Archstr.
2, 8610 Uster. Tel.: 044 251 50 25. Retpoŝto :
info@esperanto.ch

Marie-Louise Mûnger, Rue Centrale 4, 2112
Môtiers. Tel. : 032 861 26 28.

Retpoŝto : ml.munger@bluewin.ch

Nelida Weidmann González, respondeca por
familiaj renkontiĝoj kaj aktivecoj. Archstr. 2,
8610 Uster. Tel. : 044 251 50 25.

Komisiito pri financoj : Hans-Werner
Grossmann, Esperanto-Servo, PF 262, 4132
MuttENZ. Tel. : 076 460 89 92.

Retpoŝto: esperanto-servo@bluewin.ch

Kontonumero de SES (POSTFINANCE)

Svisa Esperanto-Societo
2300 La Chaux-de-Fonds
17-581908-4
(por kotizoj kaj donacoj)

Konsultu la retejon de SES !


www.svisa-esperanto-societo.ch



Vivo de SES

Redaktis Claude Gacond

La Ĝenerala Asembleo de SES okazos en Yverdon-les-Bains
la dimanĉon 18an de majo 2014



Prelegos sinjoro Ramon Perera el Barcelono pri la nuna politika evoluo de Katalunio.

Pro la fakto, ke kelkaj el niaj membroj laboras sabate, ni proponas al la membraro de SES kunveni dimanĉe. La kunveno devus esti la restoracio *La Grange* en la granda domo **Casino**, tute proksime de la stacidomo. Tio devus esti konfirmita, ĉar konstrulaboroj estas planitaj.

La kultura programo konsistos el du partoj : Prelego de sinjoro Ramon Perera kaj vizito al « *Maison d'Ailleurs* », kie salono estas dediĉita al Jules Verne. Fakte tiu verkisto interesiĝis pri Esperanto kaj verkis libron « *Voyage d'études* », kie la centra utopio rilatas al Esperanto en la parto « *San Carlos* ».

Horaro :

Trajnaj alvenoj ĉirkaŭ la 10h00.

10h30 : Ĝenerala Asembleo.

12h00 : Tagmanĝo.

14h00 : Prelego pri Katalunio kun posta debato.

15h30 : Ekiro al « *Maison d'Ailleurs* », kiu ekspozicias ĝis la 18h00.

La estraro de SES kore invitas vin kaj esperas je amasa partopreno.

Kontakt-personoj en Svislando

En Svislando ekzistas diversaj Esperanto-kluboĵ. Laŭ mia scio en jenaj urboĵ : Bazelo, Berno, La Chaux-de-Fonds, Lausanne, Ĝenevo, Zuriko, Wil, tio laŭ la reteĵo www.svisa-esperanto-societo.ch. Plie ekzistas GELB : Grupo Esperanto Les Brenets, ne ankoraŭ en la reteĵo, kaj SEL : Societo Esperanto Le Locle, kiu ĝis nun ne estas formale fondita.

Klubo signifas : havi asocion laŭ la svisa civila kodo, statuton, komitaton, ĝeneralan asembleon. Tiaĵ strukturoĵ estas pezaj por diversaj personoj.

Pro tio mi lanĉis la ideon dum la Ĝenerala Asembleo de SES en Staad, ke ni havu **kontakt-personojn** en diversaj lokoj. Tio ebligus al ni, se persono aŭ nova esperantisto petas pri kontakto, ekzemple ĉu en Fribourg aŭ Lucerno, ke ni povu doni al li aŭ ŝi adreson de loka esperantisto. Tio postulas nenium formalan strukturon. Ekzistus nur listo je dispono de la estraro de SES kun personoj, kiuj pretas ekrilati kun novaj esperantistoj, kun interesatoĵ aŭ kun esperantistaj turistoj migrantaj tra nia landeto.

Se vi pretas esti tia kontakt-persono en via urbo, en via regiono, kie mankas Esperanto-Klubo, tiam bonvolu anonci vin al la estraro de SES, kiu jam elkore antaŭdankas pro via disponeblo.

Mireille Grosjean.

Donacoĵ al SES en CHF, periodo aŭgusto-septembro

Tazio Carlevaro : 100, Yvette Humbert-Fink : 50, Noël Huguenin : 20, Anke Brouwer : 50, Piroska Morocz : 20. Sume : 240.

Nome de SES dankas al la malavaraj donacintoĵ Hans-Werner Grossmann.

-oOo-

Pri la postsomera kunveno de la 31a de aŭgusto

La sabaton 31an de aŭgusto kunvenis nur 4 ekskursemuloĵ, ĉar la informo pri tiu aŭtuna renkonto estis bedaŭrinde diskonigita nur per mencio en la *Svisa Kalendaro*. Jam en la regiona trajno de La Chaux-de-Fonds al Bielo ni kuniĝis kaj gaje babiladis.

La vetero favoris nin per somera varmo kaj bluega ĉielo. Evidente la organizanto Mireille Grosjean amike rilatas kun Sankta Petro, kies insulon ni atingis per turisma ŝipo. Ni agrable promenis sur la duoninsulo, kiu estis vera insulo en la epoko de Jean-Jacques Rousseau. Lagborde ni elsakigis nian piknikaĵon kaj ĝuis pri la pejzaĝa panoramo. Ni plue marŝis al kasteleto, kie dum 6 semajnoj en 1765 restadis la filozofo, kiu per sia verkaro multe kontribuis al la eŭropa kulturo.

Posttagmeze ni reatingis la urbon Biel/Bienne, kie ni vizitis la novan Muzeon Robert. Fakte la familio Robert estas kvazaŭ dinastio de artistoj. La pentristo Philippe Robert estas praparenco de Mireille Grosjean. En la supra etaĝo ni admiris liajn precizajn pentraĵojn pri la faŭno kaj la flaŭro. En la unua kaj dua etaĝoj la muzeo

ekspoziciis pri la industria evoluo en la urbo Bielo. Tiam ege kontrastis la burĝa meblaro kun la laborista realo en horloĝa manufakturejo.

Revenante al la stacidomo trafis nin kruda realaĵo : du lertaj ŝtelistoj sukcese rabis monujon. Unu el ili puŝis nian amikon, dum la alia malbutonumis lian pantalonan poŝon kaj tuj forkuris kun lia monujo.

Dieter Rooke.

-oOo-

SFERO

Svisa Famili-etosa Esperanta Renkontiĝo
organizita de Laurent Burgbacher, Vera Pochanke kaj Marion Bélisle.



Fotis Marion Bélisle.

Muzika momento kun Laŭrenzo Loisse el Belgio, Jolane kaj Laurent Burgbacher.

Ekaŭtune okazis inter la 5a kaj la 6a de oktobro por la sesa fojo nia Svisa Familia Esperanto-Renkontiĝo aŭ SFERO, ĉi-foje en Langnau en Emmental. Troviĝanta en la kantono Bern, plimalpli meze de l' lando, la loko estas por neniu (almenaŭ neniu sviso) tro fora.

Persone mi entrajniĝis en Neuchâtel je 14h34 post fino de miaj kursoj, kaj post paŭzo en Berno, kie cetere iu maljunulino alparolis min pro la liro, kiun mi kunportis, ĉar ŝi mem ankaŭ ludas tiun maloftan instrumenton, mi jam alvenis per regiona trajno vendrede je 17h00 en Langnau.

Ĉarma urbeto meze de kamparaj montetoj, tipa – kaj fakte bela – svis-centra pejzaĝo. Ĉe la stacio ŝildo indikas *Emme Lodge*, tio estas la nomo de nia renkontiĝejo. 20 minutojn piede preter la reloj kaj jen mi alvenis al malnova granda ligna domo tipa, en trankvila kvartalo. Fakte la tuta urbo kaj regiono ŝajnas trankvilaj.

Carolin kaj Robert Weemeyer, alvenintaj el Nordgermanio post kelktaga feria vojaĝo, sidas ĉe tablo kontraŭ la domo, apud arbo. Ŝi fadenhokas (kvazaŭ trikas) ludilojn por sia kreskanta bebo, kiu dormas apude en infan-ĉareto. Mi konatiĝis kun ili antaŭ iom pli ol du jaroj, kiam kun kelkaj geamikoj ni iris pasigi la silvestrajn

tagojn ĉe ili en Hannover. Carolin tiam gravedis, do la aĝo de Anton montras la tempon, kiu pasis ekde nia lasta renkontiĝo, kaj estas granda ĝojo nun revidi ilin, kun li !

Baldaŭ alvenas Laŭrenzo ankaŭ el la Nordo, li el Bruselo, kaj aliaj, kelkaj familioj, el pli proksime. Kiam la alia Laŭrenzo (de Lausanne) alportas pormanĝajn varojn, ni komencas pretigi vespermanĝon, kaj kiam ĝi varmas kaj allogas ĉiujn al la manĝo-ĉambro, Julia, tria persono el Germanio ĵus alvenas en taŭga momento. Ni nombras ĉirkaŭ 20, aliaj venos morgaŭ.

Ni lude vesperumas per kvizo kaj amuza desegno-ludo pretigitaj de Marion, tiel ke la tago iĝas longa kaj jam sentiĝas kvazaŭ ni neniam estus forlasintaj unu la aliajn.

Nokto, matenmanĝo, sekve ni retroviĝas en komforta saloneto por kanti. Pro la malalta aĝo de pluraj partoprenantoj ni ĉefe – fakte nur – kantas infanajn kantojn, kiujn denaskuloj parkere konas : *La aŭto de la ĉef'*, *Katoj katoj*, *Rano en laget'* ...

Kaj posttagmeze serioziĝas la afero kun du ekskursoj, unu por infanoj kaj gepatroj al la urbo kaj ludoplaco, kaj unu por sendependaj plenkreskuloj : Danielle, Marion, Dieter, Nelida kaj Dietrich, Emmanuel, Ueli, Julia kaj mi trihore migras en la ĉirkaŭo, grimpas tra arbaro ĝis montosupro, admiras la belegan pejzaĝon, paŭzetas por manĝeti biskvitojn, instruas unu al aliaj nomojn de plantoj aŭ de bestoj.



Fotis Dietrich Weidmann.

Vespere koncertas Joëlle Grosjean, subite reaperinta en esperantujo kun sia sceneja nomo *Jolane*. Amuza afero estas, ke ŝi kutimas esti muzike akompanata de iu Laurent. Ĉi-lasta ne venis, sed ambaŭ hodiaŭaj muzikistoj ankaŭ nomiĝas Laurent. Bela trilingva koncerto kun intereso de ĉiuj sendepende de la aĝo.

Post kiam la infanoj enlitiĝis, kunesto daŭras bonetose kun ŝerco-rakontado. Mi ŝatas tian momenton, ĉar en proksimuma cirklo ĉiuj improvize partoprenas, kaj ĉiuj aŭskultas la parolanton. Ni tre ridas, ekzemple kiam Mario priskribas desegnan filmon aŭ kiam Dieter teatre ludas suferantan ulon.

Dimanĉe ludiĝas tabloteniso, bilardo kaj tablofutbalo ĝis kiam dum la posttagmezo homoj foriras, dise rehejmiĝas.

Laŭ mi tiu SFERO estis sukcesa, ĉar ni bone amuziĝis, malkovris la lokon, pasigis agrablan tempon komune kun etuloj sed ne nur, kaj tio sen kromkostaj aktivecoj. Diferenco rilate al aliaj fojoj ankaŭ estas, ke ni mem kuiris niajn manĝojn anstataŭ ricevi ilin de iuj kuiristoj. Tio tute konvenis, ĉar kuiri estas ne malagraba aktiveco, ĉar bongustis, kaj ĉar tio ebligis iom malaltigi la prezon de la semajnfino.

Luc Allemand.

(Du kolorfotoj sur la paĝo 2-a ankaŭ raportas pri tiu sukcesa sesa SFERO)

-oOo-

Loka vivo

Basel

Esperanto-Societo Basel

Venontaj kunvenoj : 14an de novembro kaj 12an de decembro : Zamenhofa festo en Francio.

Berno

Ago-Tago je la 17a de aŭgusto.



Fotis Benno Frauchiger

Per la nomo « *get together* » festivalo celis celebradon de la kvar oficialaj svisaj lingvoj. Temas pri junulara evento. Ni volis montri Esperanton en tiu evento, kiu okazis sur la federacia placo antaŭ la Federacia Palaco. Ni aperis kun banderolo kaj informiloj divers-lingvaj. Kompreneble ni iris al la organizantoj kaj demandis al ili, kial la nomo de la evento estas en la angla ? Ili respondis, ke ili ne volis doni preferon al unu el la kvar svisaj lingvoj kaj pro tio uzis la anglan kiel ĵokeron. Multaj personoj vidis nian esperanto-banderolon kaj pluraj personoj ricevis informilojn kaj diskutis kun nia grupo, kies grandeco variis dum la tago inter 2 kaj 6 prezentantoj.

Benno Frauchiger.

En Etoy kunvenas la Svisa Koruso

Ĉu vi ŝatas kanti en gaja etoso praktikante esperanton ?

Do simple partoprenu la kant-kunvenojn de la Svisa Esperanto-Koruso en Etoy (VD), ĉe la malnova lernejo – Le Prieuré 1, dimanĉe (10h00-15h30).

Ĝin direktas Elisabeth de Mestral - de.demestral@bluewin.ch

Muzikaj dosieroj estas senditaj por ekzerciĝi hejme kaj faciligi la muzik-legadon. Do kompreneble minimuma laboro estas postulata.

Venontaj dimanĉaj kunvenoj : 24-an de novembro, 15-an de decembro, 2014 : 25-an de januaro, 23-an de februaro, 23-an de marto.

Venonta koncerteto disvolviĝos la lundon 25an de novembro je la 15h00 en « *La Rozavère* », chemin de Rovéréaz 23, 1012 Lausanne, por festi Lucienne Dovat, kiu loĝas en tiu maljunulejo. Ŝi ricevos diplomon, kiu ŝin honoros pro membreco al UEA dum 50 jaroj !

La Chaux-de-Fonds

Benko sub la lariko August Braun en la ĝardeno de KCE



August Braun, la unua prezidanto kaj tre grava aktivulo de Kultura Centro Esperantista, esprimis la deziron al Claude Gacond, ke post lia morto liaj cindroj kune kun tiuj de lia edzino estu enterigitaj en la ĝardeno de KCE kaj ke tie oni plantu larikon, kaj ke poste ĉe tiu arbo benko fariĝu kunsidejo por esperantistoj. Modesta deziro facile realigebla.

Tiu ĉi deziro atingis la orelojn de la nuna skipo de KCE kaj plene realiĝis :

Nun ĉe la vigle kreskinta lariko eblas agrable sidi en la ĝardeno de KCE.

(Foto kaj informado de Mireille Grosjean)

Naskiĝo

La 2an de julio 2013 en La Chaux-de-Fonds naskiĝis Oleg Ricardoviĉ, filo de Ricardo kaj Oxana Rodriguez. La koncerna naskiĝ-anonco estis skribita en la lingvoj rusa, franca, esperanta kaj hispana. Do certe la bebo fariĝos poligloto kaj espereble ankaŭ parolanto de esperanto. Jen la familia adreso : Ricardo kaj Oxana Rodriguez, Léopold-Robert 12, 2300 La Chaux-de-Fonds. Gratulon al la triopo : gepatroj kaj bebo !

Genève

La Stelo

9an de novembro :

Ekskurso por viziti la lernejon *La Grande Ourse* en La Chaux-de-Fonds.

Lausanne

Festo honore al Lucienne Dovat

Lucienne Dovat nun loĝas en la maljunulejo *La Rozavère* en Lausanne. Ŝin festos la Svisa Esperanto-Koruso la lundon 25an de novembro je la 15a horo. Partoprenu tiun feston !

Lucienne Dovat ricevis en Rejkjaviko diplomon de UEA pro sia membreco en UEA dum sinsekvaj 50 jaroj! Sed ĉar ŝi ne partoprenis la Universalan Kongreson, tiam Mireille Grosjean revenis el Islando kun la koncerna diplomo, kiun ŝi esperas povi mem transdoni al Lucienne la 25an de novembro okaze de la festeto, al kiu ĉiuj estas invitataj.

Lucienne Dovat jam estas honora membro de SES.

La svisa televido realigis filmon, kiam 93-jaraĝa Lucienne Dovat devis forlasi sian domon en Renens por eniri maljunulejon. Tiun filmon oni povas nun spekti tra la retejo www.cdéli.org de la Amikaro de CDELI, kiun prizorgas Stefano Keller.

Jen kiel agi : Konsultante la retejon www.cdéli.org iru al la rubriko arkivoj de esperantistoj kaj serĉu sub la litero D la nomon Dovat Lucienne. Kaj vi trovos la franclingvan filmon emociigan, kiu komprenigas la malfacilan situacion de la maljunuloj devigataj rezigni pri la propra domo, kiam alvenas la momento eniri maljunulejon. Vi konstatos, ke Lucienne Dovat estis, kaj certe restas, kuraĝulino.

Le Locle

Ekspozicio kaj ekspozicimaterialo

Bela ekspozicio pri Esperanto estis starigita en supera lernejo de Le Locle. Por ĝi Mireille Grosjean liveris sian materialon kaj la bibliotekistoj organizis adekvatan

prezenton en la biblioteko de CIFOM, lertiga centro en la montara parto de la neŭŝatela kantono. Tiun lernejon frekventas 1200 gestudentoj. La ekspozicio daŭris dum la monatoj septembro kaj oktobro.

La varbmateriale de Mireille Grosjean oni povas vidi tie :

<http://mirejo3.blogspot.ch/2011/09/varbmateriale.html>

Eblas ĝin mendi, se vi havas eblon prezenti ĝin. Mireille Grosjean volonte pruntedonas ĝin.

Kaj ne forgesu, ke Sonia Daubercies en Belmont/Lausanne kun Charlotte Blanc Maillard ankaŭ havas ekspozicion, kiun ŝi mem preparis kaj montris en Vevey kaj en Berno.

Vi krome sciu, ke disdonebla materialo atendas en la remizo de Mireille Grosjean. Bonvolu ĝin mendi, se vi bezonas ion. La germanlingvaj informiloj kun ĝusta adreso por SES ne ankoraŭ alvenis. En atendo vin servi elkore salutas Mireille Grosjean.

Les Brenets

AikidEo

AikidEo estas kunmetaĵo de Aikido kaj de Esperanto. Tiun ideon lanĉis du aikido-praktikantoj kaj esperantistoj : Doktoro Christoph Klawe el Treviro (Germanio) kaj Mireille Grosjean el Les Brenets.

Aikido estas senperforta luktarto el Japanio. Konsultu pri aikido :


<http://mirejo3.blogspot.ch/2012/10/aikido.html>

<http://eo.wikipedia.org/wiki/Aikido>

La ideo de tiu **AikidEo** estas konigi aikidon al esperantistoj kaj konigi esperanton al aikido-praktikantoj. La unua fakto estis prelego de Doktoro Klawe en Luksemburgio en marto 2012. La dua paŝo samjare estis prelego de Mireille Grosjean en Hanojo dum la UK. Ŝia temo estis aikido kaj japana pedagogio. La tria paŝo en oktobro 2012 estis prelego de Doktoro Klawe en Antwerpeno. La kvara atingo de tiu ideo estis aperigo de artikolo en la germana lingvo en la aikido-revuo de Germanio "*Aikido-Magazin*". Temas pri dupaĝa teksto tre detala aperinta en la junia numero. Poste ĉijare sekvis prelego de Mireille Grosjean dum la UK en Rejkjaviko pri aikido, kaj prelego kun ekzercado de aikido por ĉiuj dum ARKONES en Poznan, Pollando. Kontaktoj kun poznanaj aikido-praktikantoj jam okazis.

Sciendas, ke aikido kaj Esperanto ligiĝas historie: Ĉe Oomoto en Japanio oni praktikas kaj aikidon kaj Esperanton pro la fakto, ke la fondinto de aikido Majstro Ueshiba dum jardekoj vivis kiel frato kun Onisaburo Deguchi, gravulo en la dinastio de la gvida familio Deguchi. Pri tiuj ligoj Mireille Grosjean abunde esploris en Japanio.

-oOo-



Al kongresoj kaj vivo tuthomara

Italoj kongresas grandioze
Bruno Graf

La jara itala kongreso estas kopio de UK en pli eta kadro. Italoj ŝatas grandiozon. La ĉijara kongreso estis la 80-a, ĝi daŭris de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto, okazis sur la montetoj de Castellaro apud San Remo en golfa rezidloko. Ĉeestis ĉirkau 250 partoprenantoj el 30 nacioj. Eksterlandanoj pagas nur la duonan kotizon, vere malmulte por riĉa programo, kaj tial venas multnombre.

La kongresa slogano estis : *Sin kompreni por sin respekti*. Pro tiu temo la kongreso ricevis subvencion de la Eŭropa Unio. La programo estas konceptita tiel, ke okazis samtempe du aŭ pli da aktivecoj. Ĉeestanto povas/devas elekti kaj tial estas kelkfoje en dilemo. Ĉefpartoj estas la lingvokursoj, prelegoj kaj seminarioj, koncertoj kaj teatraĵoj, ekskursoj kaj noktaj amuzaĵoj. Multaj venis por turismi kaj ne parolis esperanton tre flue.

Humphrey Tonkin festparoladis dum la inaŭguro pri *Esperanto, ponto por la eŭropa kulturo*. Mi ankaŭ tre aprezis liajn prelegojn pri *Ŝekspiro, la moralisto kaj dramisto*. Post lia morto lia reputacio kreskis tiel, ke liaj verkoj fariĝis valoraj teatraj varoj, kvankam lia lingvaĵo ŝajnas hodiaŭ ne tre facile legebla.

Matene mi partoprenis kun ĝuo la seminarion de Paul Gubbins pri *Eŭropa kulturo tra esperanto*, kiu ebligas per tradukoj malkovri literaturaĵojn ankaŭ de malpli konataj kulturoj. Ni komparis esperantajn tradukaĵojn kun la originalaj tekstoj kaj debatis pri ili. Tamen granda parto de la interesatoj preferas originalan literaturon.

La kongresa komitato interesigis politikistojn kaj la publikon. La urbestro de Castellaro bondeziris la gastojn itallingve dum la inaŭguro, same li adiaŭis ilin sur la placo de la vilaĝo. La urbestro de la lastjara kongreso en Sicilio venis por ricevi la honoran membrecon de la Itala Esperanto-Federacio, kiel danko pro la ampleksa subteno. Li kvazaŭ esperantigis la urbon, iniciatis esperanto-kursojn en lernejoj kaj ligis rilatojn kun Bialistoko. La poŝto eldonis specialan stampon kiel en antaŭaj jaroj.

Ankaŭ okazis Internacia Vespero, sed mankis la talentoj. Kontraŭe la nokta vivo estis vigla, tiel ke gejunuloj lakis matene. Sur la placo de la vilaĝo aŭ en la kongresejo Kim Henriksen akordeonis, Guillaume Armide pianludis, Georgo Handzlik teatris kun Sasha Pilipovic en nova spektaklo, Grazia Barboni kaj

nederlanda-frisa grupo Kapriol' koncertis. Ekde la 23h estis nokta meditado, sed mi ne scias pri kio temas, ĉar mi jam enlitiĝis.


Bruno Graf.

La venontjara 81-a *Itala Kongreso de Esperanto* okazos en Fai della Paganella en Trento de la 23-a ĝis la 30-a de aŭgusto 2014, kiel anoncas la varbilo troviĝanta en nia bulteno. La entuziasma raporto de Bruno Graf instigu multajn svisojn aliĝi al tiu itala Universala Kongreseto.

Somero 2013

Karavanoj kaj kvardek tagoj en Esperantujo

Luc Allemand



La 11-an de julio komenciĝas la vojaĝo, por mi el Neuchâtel (Svislando). Trajna karavano estis planita de Strasburgo (Francio) al Martin (Slovakio), kie okazos *SES* (Somera Esperanto Studado) de la vendredo 12-a ĝis la vendredo 19-a.

Malbonan novaĵon mi ricevas unu tagon antaŭ la foriro : Neniu krom Meva, Matthieu kaj mi aliĝis al la karavano, kaj eĉ ĝia organizanto Alekĉjo ne povas veni, retenita en Brazilo.

Kunvojaĝantan grupon de pluraj personoj oni nomas karavano, do ĉu nur triope... ? Tamen jes, ni faru ĝin kiel planite, eĉ triope, eĉ sen Alekĉjo, ni elturniĝos ! Do je la 07h30 mi ektrajnas orienten tra Svislando, kaj je 11h00 mi retrovas miajn du francajn geamikojn en Lindau ĉe la Bodensee/Konstanca Lago. Ili alvenas tie 20 minutojn post mi, tio lasas al mi tempon por aĉeti tri kafojn. Kaj plu orienten en Germanio, laŭ la aŭstra landlimo, nun triope la tempo pasas pli rapide.

Ie en Aŭstrio okazas io, kio povus esti malbona por ni. Sed dank'al Dio kaj al la bonkoreco de iuj fervojistoj, nia afero bone solviĝos. Ni devis aĉeti novan regionan grupbileton (karavana sistemo, por vojaĝi malmulte koste). Ĉe giĉeto virino diras, ke ni aĉetu ĝin en la trajno mem. Sed tie kontrolisto forpelas nin antaŭ ol la trajno ekas, parolante iun nekompreneblan dialekton. Ni do iras per posta trajno, sed jen fervojisto anoncas malbonan novaĵon al ni : Ni alvenos tro malfrue en sekva ŝanĝstacio por povi atingi Vienon la saman tagon, almenaŭ per la regionaj trajnoj, per kiuj ni rajtas iri kun nia malmultekosta bileto. Sola eblo estus iri per alia, multekosta trajno.

Iom poste, dum ni triste pripensas, kion fari, la fervojisto venas al ni ridetante anonci, ke li telefonis kun siaj kolegoj, por ke ni ekcepte rajtu vojaĝi ĝis Vieno per la luksa rapida trajno kun nia regiona bileto.

Ni alvenas en Vrutky, slovaka najbara urbo de nia celo, la sekvan matenon je la 02h30. Sekva trajno al Martin estas du horojn poste. Ni ne emas atendi, kaj taksio kostas ne tro ĉi-tie, ĉefe por tri homoj. Do post varma ĉokolado en nokta trinkejo ni decidas uzi tiun alternativon kaj alvenas je la 03h30 en Martin, antaŭ la *SES*-ejo.

Telefonnumero de Megy staras ĉe la pordo. Ni vokas, vekas ŝin, ŝi venas malfermi al ni. Jam ni ricevas ĉambrojn kaj finfine dormas, almenaŭ kelkajn matenajn horojn.

Somera Esperanto Studado

La venontan tagon alvenas la 230 partoprenantoj al la semajno el 27 landoj. Ĝoje pasas *SES*, kiel ĉiu esperanto-renkontiĝo, mojose, freneze, tro rapide. Matene ni iras lernejen en dek diversajn klasojn laŭ nia nivelo. La organizantoj invitis spertajn esperanto-intruistojn, kiel Stano Marček (SK), Zlatko Tišljarić (HR), Christophe Chazarein (FR), Birke Dockhorn (DE), Johannes Mueller (DE), Przemyslaw Wierzbowski (PL), Szabolcs Szilva (HU/PL), Tim Morley (GB), Konstantin Tiĥomirov (RU/PL), Bertilo Wennergren (DE).

La plej altnivela grupo (el kiu mi estas) lernas de Konstantin fakajn vortojn por paroli pri specifaj temoj kiel anatomio, besto-vivmanieroj aŭ diversepokaj armeoj. Bertilo klarigas tiklajn gramatikaĵojn, kiuj kelkfoje konsciigas aŭ instigas pensi, ke nur por komencantoj esperanto estas simpla lingvo.

Posttagmezoj estas dediĉitaj al diverstemaj prelegoj, al sporto, ekskursetoj, ludoj, enkondukoj al aliaj lingvoj krom esperanto. Cetere la plej vendata libro de la libroservo, ĵus eldonita de E@i, estas lernolibro pri la lingvo *toki pona*. *Toki pona* estas dekjara planlingvo, kiu tute ne konkurencas esperanton ĉar ĝia celo estas alia. Tre rapide lernebla, ĉar ĝi posedas nur 120 vortojn, ĝi portas filozofion de simpleco ; per ĝi oni ne rajtas pensi komplike kaj devas ekzerci diri rekte la plej gravan. Iĝas modo inter junaj esperantistoj amuziĝi per *toki pona*.

Ankaŭ prelegojn de Marta pri kata kaj hunda komunikado mi menciis, kaj de Stano Marček pri kuracaj sovaĝaj plantoj. Multe pli ol oni imagas, ili estas utilaj. Plantagon mi jam konis pro ĝia virto por kuraci insektajn aŭ urtikajn pikojn, sed mi ignoris ĝis nun, ke ĝi ankaŭ helpas digesti kaj kuracas diverstipajn vundojn. Ĝi ja plurfoje ekutilos por mi dum la monato.

Vesperaj koncertoj ege bonkvalitas kaj dancigas ĉiujn. Grupoj aŭ muzikistoj kiel *La Perdita Generacio* (kun Tomas Q Nilsson (Tomio), Karin Nordström, Hendrik Lönngrén (Henĝo) kaj Anna Burenius), Jonny M, *Jele* (Ĵenja kaj Lena), Johannes Mueller, vere helpas fortikigi feliĉan kaj amikecan etoson per kantoj sentoplenaj.

Por mi kiel por multaj partoprenantoj, ili ne nur estas muzikistoj, sed ankaŭ personaj amikoj, kun kiuj mi babilas, manĝas, ludas, lernas... Kaj tio malaperigas la oftan distancon (almenaŭ en ne-esperantistaj medioj) inter artistoj kaj publiko.

Partizanske

Ĝis la sekva esperanto-renkontiĝo, al kiu mi aliĝis, IJS (Internacia Junulara Semajno), okazonta en Tiszafüred (Hungario), pasos dek tagoj kaj fine de *SES* mi ne ankoraŭ scias, kie pasigi ilin. Tio iom zorgigas min. Mi jam skribis al pluraj lokaj esperantistoj, sed ĉiuj ferias. Tamen dum la lasta tago mia zorgo subite malaperas: Kiam mi demandas al Ĵofi, iu ĉarma hungarino kaj kunorganizantino, ĉu ŝi scias pri ebleco por mi, ŝi respondas surprizite, ke mi ne jam scias, ke jes mi povas iri al Partizanske kun la E@I-teamo, kaj loĝi kun ili.

E@I (prononcata *e ĉe i* kun la signifo *esperanto* aŭ *edukado ĉe Interreto*) estas sendependa esperanto-organizo kaj eldonejo, kiu zorgas pri retpaĝoj kaj projektoj rilate al esperanto aŭ al instruado de lingvoj, kiel *lernu.net* aŭ *slovaĉe.eu*... Ili ankaŭ organizas renkontiĝojn kiel *SES* kaj eldonas librojn. E@I havas sian oficejon en Partizanske, malgranda urbo en Slovakio, du horojn sude de Martin per buso. Tiun oficejon estras Peter Balašz kaj kun li laboras tie Ĵofi Pataki, Dorota kaj du staĝantoj, nune Vaclav kaj Romualda. Amuza afero estas, ke neniu krom Petro originas de Slovakio, sed de aliaj najbaraj landoj, kiel Hungario, Pollando kaj Ĉeĥio.

Kelketaj okazoj por mi helpi, ekzemple al ordigado de materialo post reveno el *SES*, kaj malkovri la sistemon de la organizo. En la malgranda loĝejo mi semajnon vivas kun Dorotka, Roma, Vaclav kaj Matthieu, kiu ankaŭ gastigas tie daŭrigante siajn feriojn. Ofte mi kuiras vespere por nia kvin-opo, kun helpo de iu el ili, tiel ili ĝoje trovas manĝon revenante el la laboro, kaj tiel mi plezure okupiĝas kaj sentas min utila.

Foje ni ankaŭ ekskursas kune piede al apuda vilaĝo, kaj revenas tra arbaro, iom perdiĝas, multe ridas kaj amuziĝas. Mi jam konis tiujn geamikojn tra grandaj renkontiĝoj, sed nun en grupeto ni pli bone interkonatiĝas, iom pli profunde amikiĝas laŭ mi.

Mi volas uzi la okazon de mia vojaĝo por viziti Budapeŝton, ĉefurbo de Hungario. Do vendrede la 26-an en la stacio mi kun tristo brakumas miajn amikojn.

Jen mi denove survoje, en Slovakio, al Hungario. Soleca melankolio instigas min preni paperon el mia sako kaj skribi : En trajno tra landaj, ofte flavaj kampoj, preter vilaĝoj, urbetoj kun rustikaj, malriĉecaj stacidometoj. La trajno knare bremsas, haltas apud betuloj kvazaŭ en herbejo en unu el la du aŭ tri kajoj kun brunaj, rustaj reloj. Fervojisto venas kun ŝildo en la mano paŝante sur seka herbo, kaj signas al la ŝoforo, ke li povas sekure eki denove.

Jen mi preterpasas la urbon Nitra, kie ni estis lastjare por *SES*. Tiu nomo estis skribita sur stacia ŝildo, kaj mi rekonas la monton Zobor kun ties anteno. Herbo kreskas ĉie, metalaĵoj estas ofte brunaj, malpuraj, arboj multas ĉirkaŭ la ŝajne ne tre prizorgataj domoj. Jen videblaj diferencoj kun mia devena lando. La aŭdata lingvo ankaŭ estas klara signo.

Varmegas. Mi ŝvitas. Tamen mi ŝatas tiel vojaĝi.

Budapeŝto. Mi rekonas la stacidomon, en kiu ni lastjare pasigis horon fluginte tien el Irlando irante al Slovakio. Metroo. Necesas akiri forintojn ; la hungaran monon, por aĉeti biletan. Ruĝa linio, blua linio... Kvietaj kvartalo for de la centro, noktas. Mia gastiganto Petro trovas min kaj gvidas min al sia domo.

Iom da pano kun fromaĝo, babilado, mi lacas, iras dormi.

La sekvan tagon mi deponas miajn sakojn en ŝlos-ŝrankon de la stacidomo kaj vizitas la ĉefurbon sole, piede. Jen la Riverego Danubo, la kastelo, la parlamento (nur de malproksime, ĝi estas renovigata)... Kaj je 15h30 mi reentrajniĝas, ek orienten al Tiszafüred.

Tiszafüred, Internacia Junulara semajno (IJS)

La pejzaĝo ŝanĝiĝas. El fenestro mi ekvidas arbaron tute proksime, lagon, super kiu ni veturas tra ponto, mi miras. Jen mevoj kaj aliaj birdoj are flugas apud la trajno, malalte super la lago, harmonie el sub la ponto. Tiel paradize mi alvenas en la urbeto Tiszafüred. Ĉe ŝirmejo de la stacidomo pendas hirundaj nestoj, ĉarme la elegantaj birdoj iras kaj revenas por nutri siajn krietantajn idojn. Sur la kajo infanoj ĝoje montras : « *Feĉke, Feĉke !* » Mi jam scias, ke tiu vorto signifas « hirundo » en la hungara.

Juliana atendas min ĉitie kun sia fileto Mateo. Ŝi kondukas min al la loĝejo de sia filino Veronika, kie mi gastos dum kelkaj tagoj atendante *IJS*-n. Pico sur la plaĝo, ŝi invitas min, vere afable.

En Hungario por eniri universitaton oni devas havi diplomon pri minimume dua lingvo krom la hungara. Esperanto ankaŭ validas, kaj multaj elektas ĝin pro ĝia facileco. Juliana laboras hejme instruante ĝin. La privataj kursoj okazas eĉ kelkfoje tra *skype*, kiam la lernantoj loĝas tro for. Ŝi devis doni tian kurson ĉi-vespere, sed ŝi senkulpiĝas por tiu-ĉi por resti kun mi, por ĝui la okazon praktiki sian esperanton kun vera esperantisto, kiel ŝi diras, kaj ne nur kun lernantoj. Ankaŭ veras, ke ŝi bone zorgas pri sia gasto.

Malfacilas dormi kun la altega temperaturo. Mi ne kutimas je 30 gradoj dumnokte. La sekvajn tagon ni eĉ spertas 40 gradojn ekstere. Feliĉe dum ferioj mi ne devas labori, povas lacertumi, lasi mian energion ĉerpiĝi de la varmo, refreŝiĝi en la lago.

Foje Veronika, Mateo, Juliana kaj mi iras kun amikoj iliaj per sia motorboateto al alia strando, kie eblas naĝi en la ĉefa parto de la rivero Tisza.

Juliana disponigas al mi biciklon, per kiu mi pli kaj pli malkovras la urbeton, kaj kiam, tagon antaŭ la komenco de *IJS* la organizantoj alvenas, mi pretas gvidi ilin de la stacidomo al la kampadejo kaj iom pli. Post instalado de ilia materialo ni iras manĝi urben, instalas afiŝojn kaj indikŝildojn por la alvenontoj, pretigas ĉion.

Kaj jen *IJS* komenciĝas, kun ĉirkaŭ 70 partoprenantoj. Nia loko situas ekster la urbo, je kvin minutoj piede de la plaĝo, ideale. Prelegoj aŭ diskutrondoj pri movado, pri lokaj kursoj/kluboj, pri fido, pri denaskuloj... Kaj malpli serioze pluraj (kiel mi) sekvas denaskuliĝan kurson (gvidata de veraj denaskuloj) kaj fine ricevas denaskulecan diplomon.

Dimanĉa ekskurso bonegas : Dum pigruloj iras viziti ekologian centron kun giganta akvario, sportemuloj kanuas sur la riveroj, tra mirinda arbaro. Naŭ kanuoj are vogas kun po kvar remantoj, kaj mi fiere povas diri, ke mia kvaropo ŝajne estas unu el la plej lertaj :

Dum kelkaj embarase turniĝas aŭ per pruo tuŝacas la flankan teron, ni sukcesas kun akcepteblaj deflankiĝoj sufiĉe rekte iri. Kiam la rivero iĝas vere mallarĝa kun oftegaj akraj kurboj, Laslo, Meva, Lobo kaj mi eĉ sperte kunlaboras por ĝuste gvidi nian veturilon ĉirkaŭ la arboj. Samtempe ni miras pri la nekutima naturo kun belegaj plantoj, floroj kiel lotusoj, birdoj kaj fiŝoj. La akva safario ja indas, kvankam la rempozicio iĝas laciga, kaj kvankam iu vespo foje dolore pikas min ĉe la kolo.

Noktaj promenadoj ankaŭ menciindas. Dufoje ili estas programitaj, kaj ambaŭfoje la trookupita respondeculino petas min anstataŭi ŝin por ilin gvidi, dirante, ke ĉiukaze mi verŝajne pli bone konas la lokon ol ŝi. Mi tre volonte konsentas. Ni piediras al la lago, sekvas ĝian bordon, preterpasas haveneton kaj antaŭeniras sur vojeto malproksimiĝanta de la civilizaciaj lumoj. Kiam nenio plu aŭdeblas krom aero en arbobranĉoj, griloj, kaj ondetoj de la apuda rivero, kaj kiam neniuj lumoj plu heligas la horizonton, ni haltas, sidiĝas sur asfalto, kuŝas ankaŭ, kaj mire rigardas la ĉielon. Konstelacioj, falantaj steloj : ni nombras ilin, ni feliĉas. Iuj (iuj belgoj fakte) anstataŭ rigardi supren, kuŝas surventre kaj rigardas la asfalton. Interesan religion ili tiel kreas...

Karavano

Gvidataj de Alekĉjo, ni dudek-ope vojaĝas de Hungario al Belgio, kie komenciĝos *FESTO* (Festivalo Esperantista Somera Terure Organizita) du tagojn post la fino de *IJS*. Ĵaŭde posttagmeze : Simpla iro al Budapeŝto, kie ni pasigas la vesperon kaj dormetas du horojn en herbejo apud la domo de Stella, kie ni lasis niajn valizojn.

Vendrede je 03h15 ni vekiĝas kaj piediras al la stacidomo ; la unua trajno ekas je 04h30.

Ankoraŭ iom hungarie, kaj jen aŭstrie, germanie norden...ĉirkaŭ dekdu ŝanĝoj ĝis noktomezo ie meze de Germanio. Fervojisto permesas al ni kuŝiĝi surplanke en la

stacidomo por dormi tri horojn atendante la unuan trajnon de la sekva tago. Aventuro !

Jen Akeno (Aachen), germana urbo ĉe la belga kaj nederlanda landlimoj. Trajno al alia kvartalo, de kie ni devus per buso rapide atingi Kelmis/La Calamine ; la *FESTO*-urbon.

Sed busoj ne veturas, laŭdire ĉar iu ponto detruigis survoje. Do reen al la ĉefstacidomo, de kie ni uzu alian trajnon por iri al Hergenrat ; najbara urbo de Kelmis. Tro malfrue. La sekva iras post du horoj. Kelkaj grumbletas, lacas, frostas. Ni varmigas unu la aliajn. Post regula varmego en Hungario, ni ne plu kutimas je « nur » 20°C.

Fine de la posttagmezo ni tamen finfine atingas nian celon. En Hergenrat iu atendas nin, kunprenas niajn pakaĵojn kaj la plej lacajn el ni per buseto, la aliaj iras piede. Malgraŭ certa dormomanko mi volonte promenas horon kun Saci kaj Thomas ĝis Kelmis.

FESTO

Jen jam la lasta semajno de mia longa esperantumado. Plurajn homojn mi jam vidis en *SES* aŭ en *IJS*, kelkajn mi revidas de post unu jaro, kelkaj estas novaj. Ni muntas grandajn tendojn pruntedonitajn de iu skoltamika komunumo, kiuj iĝos la tiel nomata malluksa amasloĝejo. Pli kaj pli da homoj alvenas, pli kaj pli da privataj tendoj muntiĝas en la herbejo. Mi ŝatas tiel tranoki preskaŭ ekstere, kvankam la noktoj malvarmas : Despli multaj ni kuŝas en la sama tendo, desmalpli froste estos, kaj despli bone estos.

Famaj esperantistoj, same kiel kelkaj lokaj muzikistoj, venas denove ĝojigi nin per koncertoj ĉiuvespere. Kun *Kapriol'* ni dancas okcidenteŭropajn folkdancojn, kun *Amplifiki*, Gaëtano aŭ Jonny M. ni simple libere dancas laŭ propra inspiro, unu, du aŭ plurope, sen pensi. Krom koncerti Kimo ankaŭ instruas nin danci *salsaon* kun la helpo de Meva, dum tuta mateno.

Laŭ mi la plej impona koncerto estas tiu de *Kajto* kun Nanne kaj Ankie, ĉar per siaj kantoj ili instigas ĉiujn ne nur danci, sed ankaŭ kunkanti kun fortaj emocioj, agrablegaj sentoj de kunesto. Fine ni ĉiuj, kun ili, brakumas en granda rondo kaj kantas kanone *Mi amas...* . Du, tri, kar-voĉe ni kantas ĝin dum tempo nemezurebla kaj kantante tiun tekston mi pensas, ke neniu mensogas : Ni vere amas unu la aliajn.

Kaj dimanĉe la 18an de aŭgusto, jam venas tempo por adiaŭoj, « *ĝis JES post ses monatoj !* » aŭ « *ĝis venontjare !* » , kaj ek denove en trajno. Feliĉe kelkajn mi ne ankoraŭ devas adiaŭi : Alekĉjo, Meva, Kriĉjo, Ursula, Julia kaj mi karavanas kune suden, kaj disiĝos fine de la tago, laŭ la loĝloko de ĉiu.

Luc Allemand.

-oOo-

Sarah kaj Sylvain Meigniez daŭrigas sian mondvojaĝon

Originala maniero vojaĝi

- Dum kiom da tempo vi vojaĝas?

- Ni planas vojaĝi dum unu jaro !

- Kial vi decidis ne flugi?

- Unue niaj ekologiaj valoroj al ni pripensis la eblon vojaĝi sen flugi. Do ni serĉis aliajn veturilojn por vojaĝi. Due ni havas tempon, ni organiziĝis por vojaĝi dum unu jaro. Ni volas vere senti la vojaĝon kaj kompreneti la grandon de nia planedo. Nuntempe la dua motivo pli gravas ol la unua. La rapideco de la surteraj transportiloj fariĝis nia ŝatata vojaĝmaniero. Tiuj busoj, ĉu tremantaj ĉu novaj, tiuj motorcikloj, tiuj trajnoj, tiuj kargobotoj ebligas, ke ni alproksimiĝas al la pejzaĝoj kaj kulturoj, kiel ni neniam antaŭsupozis. Kaj tiuj veturiloj kondukas nin al nesuspektataj lokoj.

- Do vi nur vidas vintron, ĉu?

- Kio estas la difino de vintro? Fakte, ni estas sur la norda duonglobo de oktobro ĝis aprilo kaj sur la suda duonglobo de majo ĝis septembro. Sed vintro signifas moderan varmon en Sudvjetnamio (28 gradojn!), sekan veteron en la altebenaĵo en Bolivio, pluvsezono en ekvadora montaro... Malmultas la lokoj, kie ni vidis vintron malvarman kaj neĝkovritan, kiel ni kutimas en Svislando: Rusio, Mongolio, Beijing kaj Bariloche. Do dum kvindek tagoj, malpli ol du monatoj!

- Kiun landon vi plej ŝatis?

- Ni ne povas elekti. Ĉiu lando havas sian belecon kaj ĉie ni trovas multajn afablajn kaj kelkajn malafablajn homojn. Tamen se vi volas respondon, ni dirus Mongolion kaj Bolivion. Sed ni vere ŝatas la diversecon, do vojaĝi tra la mondo estas perfekte! Certe en ĉiu lando oni povus vidi aŭ fari multajn aliajn aĵojn, kiujn ni ne malkovris.

- De kie vi venas?

- Suisse, Switzerland, Suiza, Svislando, Schweiz, Schwiiz, en la rusa.

- Ĉu vere ekzistas esperantistoj?

- Jes, jes, jes! Kaj ili ofte parolas pli bone ol ni! Nia nuna esperantonivelo ebligas neforgeseblajn babiladojn, sed ni malkovris, ke kelkaj homoj eĉ komercas aŭ divastigas budistajn rakontojn pere de la internacia lingvo. Tutmonde, la diverseco kaj afableco de la Esperantistoj mirigas nin kaj kuraĝigas nin plibonigi nian Esperanton. Grandan dankon al ĉiuj Esperantistoj!

- Vivante tuttage kaj tutnokte kune, ĉu vi ankoraŭ trovas temon por interparoli?

- Jes, Sarah plue ege babilemas! ;o) Ni ŝatas havi la saman kulturan bazon por komuniki pri niaj miregoj. Ni ŝatas havi malsamajn vidpunktojn por riĉigi nian pensmanieron. Kaj kelkfoje ni ŝatas ne babili.

De la urbo turista *Cusco* ĝis la antikva civito *Machu Picchu*

Ni atingis *Cusco* la 4-an de aŭgusto matene. Multaj homoj kriis en la busstacidomo : kelkaj vendistoj de manĝaĵoj, kelkaj taksi- kaj hotel-reklamistoj. Virino venis al ni kaj diris, ke la gastejo *Quipu* povis gastigi nin malmultkoste. Ni estis tri vojaĝantoj, ĉar Fabrice, amiko el Svislando, kuniĝis dum tri semajnoj.

La gastejo estis bela kaj proksima de la urbcentro. Ni povis viziti piede la urbon. Ni promenis kaj vidis multajn preĝejojn. Bedaŭrinde ĉiuj preĝejoj estis fermitaj.

Ni trovis malgrandan muzeon, kiu nomiĝas "la muzeo de *Pachakuteq*". Ĝi estas en turo kun granda statuo sur la kulmino. *Pachakuteq* estis fama reĝo de la imperio *Inka*. Li sonĝis pri granda venko kun la helpo de dioj. Poste li batalis kontraŭ alia etno pli forta, sed li venkis. Sekve li povis fari grandan imperion. Li konstruis multajn vojojn tra la lando kaj tra la montaro. Ekzemple ĝis la montaro *Machu Picchu*.



Sylvain kaj Sarah Meigniez kaj ilia amiko Fabrice

Viziti *Machu Picchu* ege malfacilas. Ni devis aĉeti bileton frue, ĉar nur 2500 homoj povas iri tien samtempe. Kaj ankaŭ malfacilas trovi trajnbileton por veturi tien. Fakte 7 tagojn antaŭ nia vizito ni aĉetis la trajn- kaj vizitbiletojn rete. Ili estas multkostaj, sed ni ne povis iri ĝis Peruo sen vidi la plej faman konstruaĵon. Estis la plej kosta tago ekde la komenco de nia vojaĝo (antaŭ 6 monatoj). Ni planis dormi en *Ollantaytambo* kaj la sekvan tagon trajni ĝis *Machu Picchu*. Survoje al *Ollantaytambo* ni haltis en *Pisac*, kie troviĝas aliaj ruinoj de urbeto *Inka*. Tie la belajn konstruaĵojn flankas multaj terasoj por kultivi ĉefe kinuon. Fabrice sentis krurdoloron, do ni piede nur supreniris kaj malsuprenveturis taksie ĝis la urbo. En *Ollantaytambo* ni dormis en malgranda gastejo. La duŝo estis malvarma sed proksime ni trovis bonajn manĝaĵojn por varmigi nin.

La 10an de aŭgusto ni vekigis frue kaj piediris ĝis la stacidomo. Ni legis multajn avertojn pri *Machu Picchu* : malpermesite manĝi, malpermesite porti grandan sakon, malpermesite preni plastbotelon... Do ni multege matenmanĝis en la trajno por ne plu havi manĝaĵojn. Ni nur ankoraŭ havis akvon en metalbotelo. Antaŭ ol eniri *Machu Picchu* ni devis ankoraŭ pagi buson. Tiu tago estis vere multkosta. Finfine ni atingis la faman lokon. La tre impona civito estis konstruita en montpasejo inter la montoj *Wayna Picchu* kaj *Machu Picchu*. Ni supreniris la duan kaj superrigardis la malnovan urbon. Tie ni vidis ankaŭ malgrandajn terasojn : la etno *Inka* multe laboris por fari kultivaĵojn.

Fakte ni pasigis agrablan tagon kaj vidis belajn aĵojn, samkiel la antaŭan tagon kaj la sekvan tagon. Do kial tie la prezo tiom altis ?

Sylvain kaj Sarah Meigniez.

-oOo-

Okazontaĵoj

Pri la venontaj studsabatoj en CDELI

Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Strato Progrès 33, 2303 La Chaux-de-Fonds.

Buso N° 4 direkto Hôpital, haltejo Bibliothèque.

Datoj de la venontaj studsabatoj

Novembre 16, decembre 14

2014-januare 18, februare 15, marte 15, aprile 26, majo 17 kaj junio 21.

Formiĝas 3 studrondoj laŭ la lingvo-niveletoj : tutkomencantoj, mezuloj kaj lertuloj.

Partoprenkontribuo : Fr 15.- (senpage por la studentoj kaj senlaboruloj).

La decembra studsabato disvolviĝos en festa etoso.

Studhoraro : Malfermo : 10h00. Studo ekde 10h30. Komuna tagmanĝo : 12h45. Plia studo : 14h15. Konkludo : 16h30. Oficiala fermo : 17h30.

Instruantoj: Monika Molnar, Nancy Fontannaz, Luc Allemand, Stefano Keller, Nicole Margot.

Surloke aĉetblas libroj novaj kaj brokantaj.

Por aliĝi aŭ ricevi disdoneblajn informilojn kontaktu Nancy Fontannaz, ĉu rete : nancy.fontannaz@gmail.com , ĉu telefone : 021 728 31 27 (kun respondilo) ne forgesante indiki viajn nomon kaj adreson.

-oOo-

Tutsvisa kongreso pri pasedukado en Broc (FR) 9-10-ajn de novembro

Mireille Grosjean, kunorganizanto, prezentos esperanto-standon.

-oOo-

Kvina Afrika Kongreso de Esperanto (AKE) En Kotonuo en Benino ekde la 29a de decembro 2013

KVINA AFRIKA KONGRESO DE ESPERANTO *MIRINDA SUBTENO DE LA SES-MEMBROJ !*

Dum la Ĝenerala Kunveno de SES en marto 2013 en Staad (SG) decidiĝis, ke SES subtenos tiun eventon per 1000 CHF. Plie decidiĝis, ke la estraro alvokos la membrojn al plia individua subteno. Tiu alvoko ekiris meze de majo.

Hodiaŭ la 19an de oktobro alvenis al la flava konto de « Scio Sen Bariloj » (SSB) 10-752700-3, la svis-benina NGO kunorganizanto de la Kongreso, la sumo de 2830 CHF.

Donacoj en diversaj altecoj alvenis de 33 el niaj membroj ; la estraro de SES kaj la estraro de « Scio Sen Bariloj » elkore dankas pro tiu subteno !!

La preparlaboroj por tiu Kongreso antaŭeniras bone. La subteno de SES ebligos la alvenon de Sinjoro Jérémie Sabiyumva el Burundo, prezidanto de ANEB (Association Nationale pour l'Espéranto au Burundi), membro de Internacia Ekzamena Komisiono kaj tre aktiva juna viro. La plia subteno de niaj membroj ebligos pagon de flugbileto de plia membro aŭ pliaj membroj, de Afrika Komisiono de UEA. La ĝenerala kaso de la Kongreso ankaŭ devas esti nutrata. Mondskale la subteno ne estis tiom granda kiel antaŭvidite pro la ĝenerala monda financa krizo.

Ueli Haenni el Zollikofen (BE) verŝajne flugos al Kotonuo kaj subtenos la partoprenon de persono el Kamerunio, kie li restadis kaj laboris antaŭ pluraj jaroj.

La Rodanalpa Federacio subtenos la venon kaj restadon de Antoine Kouassi Kouablan el Eburya Bordo, kiu partoprenis la Universalan Kongreson en Varsovio en 1987 kaj la ILEI-Konferencon en Porto Novo en 2008. La Svisa Asocio de Edukistoj al la Paco (ne esperantista stablo, kies kun-fondinto kaj kun-prezidanto mi estas ; vidu www.asepaix.ch) subtenos la venon kaj restadon de Adjévi Adjé el Togolando, kunordiganto de Afrika Komisiono de UEA.

La programo de tiu Kongreso estas tre alloga. Vi ankoraŭ povas aliĝi kaj veni al Kotonuo por sperti afrikajn etosojn. Por trovi ĉiujn detalojn bonvolu viziti :

<http://www.esperanto-afriko.org/>

Mi mem restados en Kotonuo ekde la komenco de decembro ĝis la 13a de januaro.

Mireille Grosjean

Kun-fondinto de « Scio Sen Bariloj »

Membro de KOKo pri financoj.

-oOo-

12a Novjara Renkonto kaj 5a NIS por la gejunuloj Saarbrücken 27.12.2013 - 03.01.2014

Ĉiuj necesaj sciigoj pri la **12a Novjara Renkonto kaj la 5a NIS en Saarbrücken** kapteblas tra la retejo www.esperantoland.org

Plenkreskuloj, infanoj kaj gejunuloj feriemaj en kultura esperanto-etoso kun kursoj, koncertoj, ekskursoj, ktp... nepre partoprenu tiun aranĝon.

-oOo-

Humuro en didaktiko

Kiam mi instruis, ĉu france, ĉu esperante, ĉu en lernejo, ĉu en asocio, tre ofte mi komencis lecionon per ŝerco aŭ instigante iun diri humuraĵon. Kaj baldaŭ ĉiuj ridis kaj ekregis bonhumoro, io didaktike ĉiam favora.

Ni interesiĝu antaŭ ĉio al la instruado de esperanto. Avantaĝo de ŝerco konsistas el tio, ke plej ofte temas pri simplaj kaj mallongaj frazoj. Ne necese ĉiuj lernantoj tuj komprenos. Do tio instigas la komprenintojn klarigi al la nekompreneintoj, kio estas ridinda. Tuj kreiĝas konversacia etoso favora al la sekva instrufazo.

Sed tiu instru-tekniko dependas de la posedo de kolekto da humuraĵoj. Tial mi kreis por mi mem veran humuro-tekon. Kaj mi konstatis, ke la lernantoj mem ŝatas kopii tiujn ridindaĵojn. Ofte tiucele ili posedis not-kajereton, en kiun ili belskribis ilin. Kaj hejme ili nacilingve rediris la ŝercojn, kio fakte estis taŭga traduka aktiveco.

Jen ekzemplo de tri tre simplaj humuraĵoj por esperanto-komencantoj.

Claude Gacond.

En librovendejo

Ĉu mi povus aĉeti je kredito la libron "*Kiel oni fariĝas milionulo dum tri monatoj*"?

Kaj kiam vi intencas pagi, sinjoro?

Kompreneble, post tri monatoj.

La bona gasto

Kiam vi venos al ni por tagmanĝi?

Ni rigardu... Marde mi estos gasto, merkrede mi estos malsana; ĵaŭde mi denove estos gasto, vendrede mi estos malsana: **do** ni diru sabate.

Stulta hundo

La kuracisto : Ĉu vi ne scias, ke mia konsultado daŭras nur ĝis la kvara horo ?

Paciento : Jes, sinjoro doktoro, sed la hundo, kiu min mordis, ne sciis tion; ĝi mordis min je la kvara kaj duono.

-oOo-

Kulturaj paĝoj

Redaktas : Richard Schneller (rs), Rue Charles-Knapp 20,
2000 Neuchâtel, rischneller(ĉe)gmail.com.

Pri la enhavo kaj la stilo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Recenzoj

Mondo de travivaĵoj


de Tibor Sekelj

Recenzo de Stanislav Belov

Pri tiu famega (almenaŭ en Esperantujo) verkisto kaj vojaĝanto mi unue eksciis antaŭ kvar jaroj, kiam mi faris unuajn paŝojn en la por mi nova lingvo. Tiam mi hazarde trovis en la ruslingva Vikipedio, en kiu mi aktive laboris, ke inter « Tradukoj de la semajno » estas la esperantlingva artikolo – ĝuste pri Tibor Sekelj. Mi tralegis kaj fakte plene ruslingvigis ĝin, plian fojon mirigita de la facileco de la novakirita ilo. Tamen ne malpli admiris mi la vivhistorion de tiu homo, kiu ne babilis pri utileco kaj estonteco de la internacia lingvo, sed simple uzis ĝin – kaj faris tion majstre !

Pasis kelkaj monatoj kaj mi mendis novan stakon da libroj en la libroservo de UEA. Inter ili estis *Mondo de travivaĵoj*. Bedaŭrinde antaŭ kelka tempo urĝaj aferoj denove superŝutis min kaj mi prenis ĝin en la manojn ne tuj post finlego de la antaŭa – *Aŭstralia antologio*. Sed mia atendado estis plene

kompensita ! La libro konsistas el kelkdekoj da rakontoj, priskribantaj diversajn vojaĝojn kaj aventurojn de la aŭtoro. Afriko kaj Oceanio, Sud-Ameriko kaj Azio – ŝajnas, ke ne ekzistas



loko sur la Tero, kiun ne jam vizitis la fervora esperantisto-vojaĝemulo. Li mem agnoskas, ke li ne povas pasigi kelkajn monatojn sen veturo – kaj kial ĝeni sin? La eseoj estas ordigitaj (laŭ mia kompreno) kronologie, sed oni povas legi ilin arbitre – ekde la fino, mezo aŭ komenco de la libro. Tibor Sekelj skribas per tre facila, sed samtempe esprimplena lingvaĵo – nur malmultajn vortojn mi estis devigita serĉi en mia poŝtelefona Bokarev-vortaro.

Historioj rakontitaj de Sekelj kaptas la atenton tiom, ke oni tute forgesas pri ties lingvo kaj plene mergiĝas en tiun mirindan mondon de foraj landoj, sovaĝaj bestoj kaj diversspecaj popoloj, plejparton da kiuj oni neniam vidos. Ĉu averaĝa homo kunvivas kun kanibaloj? Aŭ eskapas de papuoj, ĉasantaj lian kapon? Ĉu iu inter ni grimpis Kilimanĝaron, trinkis tibetan teon, manĝis krokodilon, flutis por kobro, veturis sur elefanto, meditadis en kaverno kun veraj joganoj, batalis kontraŭ demonhavantaj nepalanoj – mi povus daŭrigi senĉese. Aventuroj de Sekelj estas tiom fascinaj, ke mi eĉ pli ol unu fojon transrakontis ilin al miaj konatoj kaj ĉiam trovis sinceran intereson. Jes, tiaj homoj povas multon fari por nia lingvo, sed ili ĉiam malmultas...

Mi aldonu kelkajn vortojn pri la eldono mem. La libro estas fortike bindita, presita sur ne tre blanka, sed sufiĉe bonkvalita papero kaj enhavas

dekelkon da fotoj – cetere ne tre kontrastaj, verŝajne pro mankoj de presado. Dudekjara aĝo (la 2-a eldono aperis en Edistudio en 1990) ne tre sentiĝas, kvankam oni vidas, ke temas pri ne nova libro. Tajperarojn mi preskaŭ ne trovis (aŭ ne rimarkis, ĉu?). Unuvorte, ĝi estas bona legaĵo por junuloj, revuloj kaj vojaĝemuloj de ĉiuj landoj kaj popoloj.

Postskribo. – Por mi aparte interesa estas, ke Tibor Sekelj estis ankaŭ muzeologo, estris etnografian muzeon en Zagrebo kaj eĉ unu el la subkomitatoj de ICOM (Internacia Komitato de Muzeoj). Inter liaj kontribuoj estas *Dictionarium Museologicum* – la 20-lingva muzeologa terminaro, enhavanta pli ol 1300 difinojn, inkluzive en Esperanto. Mi ekhavis la ideon meti ilin en la esperantan Vikipedion – kompreneble kun verkado de respektivaj artikoloj. Kial fari terminarojn, se la rezulto de tia grandega laboro vane polviĝas sur bibliotekaj bretoj, dum spertuloj pene serĉas taŭgajn vortojn por interkompreniĝi? Sed tio estas onta afero. Nun mi estas plene okupita de iom alia (privata) priokupo kaj havas nek tempon nek monon por plenumi tion. La vivo daŭras, do la espero realigi miajn (tro multajn) planojn ankaŭ ne forestas...

Nun mi legas *Apostolo de libereco* de Mercia MacDermott. Interesa libro ĝi estas...

La papilio

de Luiza Carol

Recenzo de Stanislav Belov


Antaŭ certa tempo mi finlegis la 6an numeron de la *Beletra Almanako*.

Aboninte ĉi tiun revuon kaj aĉetinte ĉiujn antaŭajn kajerojn, mi neniam bedaŭris tion. Kialo troviĝas ne nur en la kolora kovrilo – kvankam sufiĉe

profesia plenumado ne multas inter esperanto-eldonaĵoj (tiuj de la eldonejo Mondial konsistigas agrablan escepton). Plaĉas al mi la bunta enhavo, precipe recenzoj, kiuj servas por mi, neriparebla legemulo kaj bibliofilo, kiel gvidfadeno en nia eldon-mondeto.



Sed malgraŭ tio mi sufiĉe skeptike rilatas al (moderna) esperanto-literaturo. Lena Karpunina, Sten Johansson, ktp., laŭ mi, povas havi sukceson nur en tia malgranda mondeto kiel la nia, en foresto (aŭ malmulteco) de pli fortikaj rivaloj. Do kiam mi ekvidis en la 6a numero teatraĵon *La papilio* fare de Luiza Carol, mi unue ekpensis : ĉu preterfoliumi ĝin ? Aldone mi ne tre ŝatas teatraĵojn, almenaŭ en formo de teksto, ne en sursceniĝo.



Des pli grava estis mia miro, kiam mi tamen eklegis ĉi tiun verkon. Hm... leĝera stilo, impresaj bildoj, saĝaj vortoj. Unuflanke, temas pri sufiĉe konata situo – detruita Hiroŝimo, konversacias mezaĝa viro kaj maljunulo. Sed ili parolas pri eternaj aferoj – pri vivo kaj

morto, pri senco de la vivo (aŭ ties neekzisto), pri feliĉa kaj malfeliĉa sortoj, ktp. Oni iom post iom entiriĝas en tiun dialogon, engaĝiĝas kaj ekpensas : diablo prenu ilin, sed ili ja pravas ! Al mi tio memorigis la filmon *Rashōmon* de Akira Kurosava. Mi aldonu, ke la verko de Luiza Carol estas bone adaptita propre por esperanta sursceniĝo : nur du personoj, ĉio okazas en unu loko kaj sen multekostaj dekoracioj. Cetere, sufiĉas mia babilado, pli bone mi skribu kelkajn citaĵojn (ĉiuj apartenas al la Maljunulo).



– « *Mi opinias, ke nur Amo kaj Timo ekzistas en la animoj de la homoj. Amo kaj Timo ne povas ekzisti unu sen la alia.* »

– « *Mi ja rememoras la pasintecon, sed mi ne plu lasas ĝin detrui min. Mi ne plu portas miajn rememorojn, kvazaŭ ili estus ŝarĝoj. Mi portas ilin, kvazaŭ ili estus rakontoj.* »

Kaj la lasta :

– « *Ni ĉiuj estas kompatindaj homoj, batalantaj kontraŭ niaj propraj timoj fronte al la morto.* »



La libera enciklopedio

- Ĉefpaĝo
- Komunuma portalo
- Diskutejo
- Aktualaĵoj
- Lastaj ŝanĝoj
- Novaj paĝoj
- Hazarda paĝo
- Helpo
- Donaci

- Printi/eksporti
- Krei libron
- Elŝuti kiel PDF
- Presebla versio

- Iloj
- Ligiloj ĉi tien
- Rilataj paĝoj
- Specialaj paĝoj
- Konstanta ligilo
- Informoj pri la paĝo
- Citu ĉi tiun artikolon
- Alŝuti al Komunejo

- Lingvoj

Krei novan konton Ensaluti

Artikolo [Diskuto](#) [Legi](#) [Kontrolendaj ŝanĝoj](#) [Redakti](#) [Vidi historion](#)

Universalaj Lingvoj en Svislando/Listo de lokoj kaj nomoj r ĉiitaj

La plej lasta reviziita versio (listigi ĉiujn) estis aprobita je 11 Maj, 2012, 2 ŝanĝoj bezonas kontrolon.

A B C Ĉ D E F G Ĝ H Ĥ I J K L M N O P Q R S Ŝ T U Ŭ V W X Y Z


Tiu-ĉi artikolo entenas liston de lokoj, personoj kaj ŝlosilvortoj menciitaj en la verko *Universalaj Lingvoj en Svislando* de Andreas Künzli. Temas do praktike pri indekso, kiu en la libro mem mankas.

La suba listo respektive indekso funkcias jene: Maldekste troveblas la ŝlosilvorto, kutime kun vikia ligilo al la koncerna artikolo en la Esperanto-vikipedio, se tia ekzistas. Tiam sekvas la paĝoj, sur kiuj la koncerna ŝlosilvorto aperas, respektive estas aparta pritrakta. Paĝciferoj *kursivaj* signifas, ke la koncerna teksto ĉefe traktas la koncernan temon. Kiam post la paĝcifero aperas kursiva b, tio signifas, ke tie estas bildo pri la koncerna persono aŭ objekto. En kelkaj okazoj precipe ĉe loknomoj en tiu-ĉi indekso la ŝlosilvorto aperas en kutima Esperanto-formo, kvankam la koncerna vorto en la indekso estas skribita sur la koncerna paĝo en la germana (ekzemple *Araŭo* en la enciklopedio aperas nur en la germana formo *Aarau*).

La ŝlosilvortoj *Esperanto*, *Interlingvistiko*, *Svisa Esperanto-Societo* kaj *CDELI* listigas nur la tekstojn, kiuj aparte traktas tiujn temojn, ĉar sen tio oni devintus indiki praktike ĉiujn paĝojn ĉe tiuj vortoj, kio ne donus sencoon.

A [\[redakti\]](#)

- **Aalen** (p. 229)
- **Aarhus** (p. 231)
- **Abegg, Max** (p. 194, 242, 203, 1085)
- **Abelmonde** (p. 915)
- **Aebv, Paul** (p. 1085)
- **Altherr, Hans** (p. 203, 236, 1085)
- **Altstätten SG** (p. 151)
- **Amadruz, César** (p. 1085)
- **Amman, Heinrich** (p. 1085)
- **Amriswil** (p. 687)
- **Araŭo** (p. 190, 195, 205, 302, 653, 667)
- **Arbenz, Paul** (p. 1085)
- **Arduser, Martin** (p. 192, 218b, 242, 1085)
- **Argovio** (p. 150, 205, 206)
- **Ari, Valerio** (p. 246, 247, 636, 1085).



Retadreso por la indekso de *Universalaj Lingvoj en Svislando* en Vikipedio : http://eo.wikipedia.org/wiki/Universalaj_Lingvoj_en_Svislando/Listo_de_lokoj_kaj_nomoj_menciitaj

Konsultindaj retpaĝoj

Peranto ĉi tie prezentas son- kaj filmdokumentojn en Esperanto. [Filmetoj](#)

<http://aldone.de/retradio>

Propraj produktaĵoj de la Esperanta Retradio

Programado kun muzika interludo

- Bonvenon de la Esperanta Retradio
- Muzika interludo: La Moldavo (Smetana)
- Filmoj akrobilas la lernadon
- Interluda muziko: Katalua
- Kiuna kanto kaj kiuna paroli feliĉas
- Interluda muziko: Creed Leadon
- Ĉu vi havas lernon?
- Koncerto por Piano (Rafmaninov)
- Skribu al mi sub retradio@aldone.de

Esperanta Retradio
uzas [Dewplayer](#)

Skribu al retradio@aldone.de

Atenton: La novaj sonartikoloj estas elvokablaj ekde la 9:00 MEST (7:00 UTS) de la koncerna tago

Posteruso ĉesis funkcii la 30-an de aprilo.
Ĝin anstataŭas [Blogspot](#).

Oktobro 2013

Anton Oberndorfer: Propraj sentoj ĝenas la empaton	16-10-2013	04:51	Aŭskultu
Anton Oberndorfer: Movoj malkaŝas la personecon	15-10-2013	04:24	Aŭskultu
Gian Piero Savio: La "Fotoplastikon" de Varsovio	14-10-2013	05:39	Aŭskultu
Anton Oberndorfer: Unuafoje trufo kultivata en norda Germanio	13-10-2013	04:43	Aŭskultu
Anton Oberndorfer: Respondeco post malsukceso	12-10-2013	04:41	Aŭskultu
Anton Oberndorfer: Sporto anstataŭ pilaĵoj	11-10-2013	04:28	Aŭskultu
Anton Oberndorfer: Ĉiam freŝaj panjoj kaj bulkoj	10-10-2013	04:24	Aŭskultu
Anton Oberndorfer: Rigardi en la okulojn de alia homo	09-10-2013	04:36	Aŭskultu
Gian Piero Savio: Pri japana filmo "Kapti la patron"	08-10-2013	05:56	Aŭskultu
Anton Oberndorfer: Plenkreski ĝis 25 jaroj	07-10-2013	05:17	Aŭskultu
Anton Oberndorfer: La polenco de la paroladoj kun si mem	06-10-2013	06:21	Aŭskultu
Anton Oberndorfer: Pozitiva konscio naskas pozitivajn faktojn	05-10-2013	04:32	Aŭskultu
Gian Piero Savio: Fejsbuko mortas, longe vivu la nova reĝo!	04-10-2013	05:28	Aŭskultu
Anton Oberndorfer: Ĉu kafeino bremsas la cerban disvolviĝon?	03-10-2013	04:16	Aŭskultu
Gian Piero Savio: Okaze de 2-jara kunlaborado kun la ERR	02-10-2013	06:34	Aŭskultu
Paŭlo S. Viana: Kiel infanoj lernas novajn vortojn	01-10-2013	05:00	Aŭskultu

Septembro 2013

Esperanta retradio de Anton Oberndorfer serĉas kunlaborantojn : <http://esperantaretradio.blogspot.ch/>

La svisa ekonomia modelo

(rs) La diskutado pri « ekonomiaj modeloj » iĝis tre ofta en Francio rilate la svedan, danan, germanan ekonomiajn modelojn, sed oni apenaŭ mencias la svisan. François Garçon, esploristo-instruanto en la Universitato Paris I, verkis studon bone dokumentitan sub la iom provoka titolo « La svisa modelo : kial ili elturniĝas multe pli bone ol la aliaj ? ».¹

La aŭtoro estis intervjuita dum pri-ekonomia elsendo² de Radio France Culture. Enkonduke temas pri ĝenerala superrigardo kaj resumo de kelkaj faktoj ne sufiĉe konataj pri la forta svisa ekonomio. La Malneta Enlanda Produkto (MEP) kreskos je 2% en 2013; la svisa MEP atingas jare 500 miliardojn da eŭroj (proporcie ekzemple la duoblo de Francio kaj 30% pli alta ol tiu de Germanio). La kliŝoj pri bovinoj, fromaĝoj, ĉokoladoj kaj orbrikoj estas sufiĉe disvastigita, sed grandparte eraraj. Svisio havas fortan industrion : maŝinoj, elektra industrio, metalurgio, kaj estas ĉefefeksportanto en ĉi tiuj kampoj. La MEP por la industrio konsistigas 20% (Francio 12%) kaj por la svisaj bankoj mirige nur 7%. La industrio produktas precipe varojn kun forta plusvaloro en la branĉoj farmacio, kemio, preciza mekaniko, nutraĵoj, kaj oni eksportas tradicie al plej foraj merkatoj. La eksporta bilanco estas supera por Usono, Japanio kaj Ĉinio.

¹ Le modèle suisse : pourquoi ils s'en sortent beaucoup mieux que les autres ? Perrin 2011.

² <http://www.franceculture.fr/emission-les-carnets-de-l-economie-francois-garcon-14-quelques-points-forts-de-l-economie-suisse-201>

La malalta senlaboreco oscilas ĉirkaŭ 3% – por la 15-24-jaruloj ĉirkaŭ 3,6%. Rilate lukron 96,3% de la salajrujoj havas monatan malnetan gajnon pli altan ol 3000 frankoj (2430 eŭroj). La vivnivelo estas bona, sed la vivo multekosta. Ne ekzistas minimuma salajro laŭleĝa, sed tia salajro estas ofte fiksita en kolektivaj laborkontraktoj en diversaj branĉoj. La sindikato UNIA lastatempe lanĉis iniciaton por laŭleĝa salajro minimuma, kiu situus por plentempa dungito je 4000 svisaj frankoj (3270 eŭroj) por deca vivo en Svisio, lando kun altaj impostoj kaj multekostaj socialaj asekuroj ĉefe privataj.

Sekvas pritrakto de la profesikleriga sistemo : proksimume 70% de la junuloj elektas metilernadon kaj proks. 30% abiturientecon (en multaj aliaj landoj la proporcio estas proks. inversa). La intervjuito insistas pri la kvalito de svisaj altlernejoj citante ekzemple la politeknikan altlernejon ETH en Zuriko kun alta prestiĝo en internacia komparo : granda nombro de nobelpremiitoj, multaj eksterlandaj profesoroj kaj studentoj, malaltaj kostoj por studado kaj administrado.

Menciindas la politika sistemo : la ekonomia kulturo de la politika elito (duono de la parlamentanoj estas samtempe responsuloj de malgrandaj entreprenoj kaj ne politikaj funkciuloj !) kaj la duonprofesia sistemo de la parlamento (52 tagoj jare en 4 sesioj po 13 tagoj). La entreprenoj estas bonvenaj kaj ĉio estas farata por ke ili povu prosperi. En duonrekta demokratio la civitanoj-impostpagantoj povas per iniciatoj kaj referendumoj kontroli la elspezojn de la politikistoj.

Ĉu vi memoras Kvinpetalon ?

Nicole Margot

Aŭ ĉu eble vi ne apartenas al la fojaj vizitantoj de tiu kulturcentro dum la jaroj 1980-90. Tial eksci, ke la kulturcentro Kvinpetalo estis kreita en 1985, laŭ la instigo kaj helpe de la heredaĵo de Yvonne Martinot, sude de Poitiers en Bouresse, la vilaĝo de Suzanne Bourot, kiu gvidis ĝin kun Georges Lagrange dum preskaŭ 20 jaroj. Ĉar la Societo Yvonne Martinot aĉetis kvin dometojn iom cirkle aranĝitajn ĉirkaŭ ĝardena korteto oni donis al la centro la nomon Kvinpetalo. Multaj svisoj, same kiel mi, ofte vojaĝis al Bouresse por sekvi staĝojn kaj ĝui la akcepteman etoson de la centro.

Fine de la somero 2011 mi decidis reiri al Kvinpetalo por trejniĝi pri tradukado. Tien mi ne plu vojaĝis ekde iu printempo, kiu malgaje koincidis kun la lastaj tagoj de Georges Lagrange. Jam en tiu epoko Suzanne Bourot esprimis siajn dubojn pri la centro, kies daŭran prizorgadon ŝi deziris baldaŭ forlasi. Kiu reprenos la taskon ? Kiu paro pretos instaligi en la vilaĝo Bouresse por daŭre okupiĝi pri la centro ?

Ĉiuj konas la malfacilaĵojn de tiuj kulturaj centroj, kies kreantoj devas iu-momente pensi pri transdonado de la respondeco al posteuloj. Ili dediĉis grandan parton de sia vivo al la gastigado de esperantistoj, donis animon al la prizorgata gastejo, kreis « klientaron », kiu fideme partoprenis la aktivaĵojn proponatajn kaj famigis la centron. Kaj subite iu alia, kun alia personeco, aliaj ideoj, devas repreni la taskon. Tio mal-ofte okazas glate.

Kun Alain Favre mi do reprenis la vojon al la piktavia regiono (ĉirkaŭ la urbo Poitou) trafrante Francion de oriento al preskaŭ okcidento, traveturante la dolĉajn montetojn de Burgonjo, la Burbonan regionon artefarite kreitan kun Aŭvernio, la Berry-regionon centre de Francio, por alveni en la valon de rivero Vieno. En Lussac-les-Châteaux ni ne plu memoris kiun vojeton maldokstren uzi por atingi Bouresse, kaj nia eraro perdigis nin en la vilaĝaro de la regiono. Tamen de fore ni vidis la sonorilturon de la kvadratforma Buresa preĝejo kaj sufiĉe rapide retrovis la straton *Le Lavoir* kelkdek metrojn pli antaŭe. Ni haltis antaŭ la bone konata enirejo suprekovrita de eta galerio, kiu ligas du dometojn.

La kutima ŝildeto kun la nomo *Kvinpetalo* pluestis. Kiel kutime ni elirigis la pakaĵojn por pli poste parkigi la aŭtomobilon sur la preĝeja placo, kaj eniris en la herbkorteton meze de la kvin petale aranĝitaj dometoj. Granda silento, vakuo, ioma forlasiteco, la belaj floroj de Suzanne grandparte malaperis, nur iuj ankoraŭ senĝene montris sin inter forpasintaj floraj kunuloj. Neniu pordo malfermita.



*Tegmento vidita el mia ĉambro.
(Foto Nicole Margot)*



Post sufiĉe longa momento mi aŭdis regulan balaadon malantaŭ heĝo, iom pli oriente. Mi aŭdacis proksimiĝi. Viro salutis. « Mi serĉas la respondeculojn de la Kvinpetalo ! » – « Bonvenon », respondis li en Esperanto, « mi nomiĝas Bernard Lagrange. » – « Vi estas filo de Georges, ĉu ? » Post fino de la sinprezentado Bernard kondukis nin pli suden al la nova enirejo, la nova kerno de la Centro. Kaj en granda kuirejo akceptis nin Claude Nourmont kaj Brian Moon.

De la eta hejmeca manĝosaloneto de Suzanne, kie ni frandis hejmkuiritajn marmeladojn kaj bongustajn legomsupojn, de tiu florumita korteto, kie oni unufoje semajne krespe festumis, la centro kliniĝis al sudo alprenante alian hejmecan etoson. Dum tuta semajno ni gustumis la bongustajn pladojn de Claude, kiu tiam kuireje deĵoris. Rémy, staĝanto loĝanta en la najbareco, regule venis kun produktoj de sia ĝardeno, plurkoloraj tomatoj, prunoj, hejmfaritaj sukaj ktp. Kaj dum la manĝoj Claude



rakontis la vilaĝajn klaĉojn oreplukitajn en la mediateko de la vilaĝo.

Traduki

Brian, vicprezidanto de la Akademio de Esperanto, 35 jarojn laboris kiel tradukisto ĉe la Eŭropa Komisiono kaj tial aparte kompetentas por gvidi alt-nivelan tradukstaĝon. Li perfektigeme postulis la ĝustan esprimon, konsciigante nin pri tipaj franclingvaj esprimoj, kiuj devas esti esprimitaj alimaniere en Esperanto.

Ekzemple la franca finaĵo *-é* ne nur tradukiĝas per *-ita*. Kaj la vorto *toujours* povas signifi *ĉiam*, sed ankaŭ *ankoraŭ* kaj *plu*. « Via tradukaĵo sekvu la regulojn de la cellingvo kaj aspektu kiel originalo », konsilis li. La fakto, ke li estas britdevena kaj ne denaske parolas la francan ja alportis al la franclingvaj staĝantoj iun interesan distancigon pri la origina lingvo. Tamen la staĝo ne nur celis franclingvanojn, kaj se alilingvanoj aliĝus oni proponus diverslingvajn originajn tekstojn.

Nia gvidanto unue atentigis nin pri la problemoj renkontitaj en sia profesio. Kiel ekzemple traduki la francan vorton *règlement*? Ĉu *regularo* dum temas foje pri nur unu regulo. La diskuto ŝajne ne novis kaj Zamenhof mem proponis la verbon *reglamenti* kiu facile donas *reglamento*-n. Ĉu oni povas « adopti » leĝon aŭ nur infanon? Pri leĝoj prefere ilin alpreni.

Piktaviaj erikejoj

Aparte interesis min la traduko de lokaj informiloj turismaj, kiuj ebligis pli profundan konon de la regiono. En la 16a jarcento la regiono havis 50 000 hektarojn da erikejoj. Ekde la 17a jarcento la teroj, tro ekspluatitaj por provizi la proksimajn forĝejojn per bruligno, postlasis malriĉigitajn grundojn, sur kiuj ekkreskis tiel nomata regresa vegetara kovraĵo.

La franca vorto *brande* indikas kaj la balailan erikon kaj erikejon, la tipon de tereno, kie kreskas diversaj specoj de erikoj sed ankaŭ genistoj, uleksoj, kelkaj gramineoj kaj filikoj sur grundoj malriĉaj kaj ne kultivitaj. Du ĉefaj specoj de erikoj kreskas sur tiuj grundoj, la granda eriko, nome la balaila eriko (*Erica Scoparia*) kaj la cindrokolora eriko (*Erika cinerea*) pli eta. Kiam tiuj spacoj florplenas, du regas, la roza de la erikoj kaj la flava de la uleksoj kaj de la genistoj.

Antaŭ ol amase detruiri ilin, oni multe ekspluatis la erikejojn en la regiono por konstrui dometojn, tegmentojn, barilojn, korbojn, ktp. Apud la preĝejo de Bouresse la komunumo konstruigis erikbranĉan remizon, por ke la memoro pri tiu tradicia uzado ne perdiĝu.



Preĝejo de Bouresse el Kvinpetalo. (Fotoj N. M.)



La bongustaj pladoj de Claude.



Remizo el eriko antaŭ la preĝejo de Bouresse. (Foto N. M.)

Dum libertempa posttagmezo ni vizitis unu el la lastaj erikejoj proksime de Lussac-les-Châteaux kun la ekspertaj botanikaj klarigoj de Alain Favre.

Ni do decidis reveni al Bouresse en 2012 por samtempe ĉeesti la Ĝeneralan Kunvenon de Societo Yvonne Martinot (SYM) kaj perfektigi niajn tradukkapablojn. La Ĝenerala Asembleo montris, ke ja la membroj de la asocio kundividas multajn zorgojn sed ni ricevis fortan impreson, ke homoj firme deziras, ke la centro pluvivu kaj engaĝiĝas favore al tio.

Dum tiu staĝo ni rekomencis traduki turismajn informilojn pri la piktavia regiono.

La merovida nekropolo de Civaux

Aparte interesaj estis la informoj pri la merovida nekropolo de Civaux. Civaux, kiu gastigas ekde 1997 atom-energian centralon, ankaŭ posedas historian unikajon, nekropolon funkciantan de 2000 jaroj. Kreita en la romia

epoko sed aparte fama dum la Mezepoko; en ĝi oni daŭre entombigas homojn.

« Legendo antikva rakontas, ke post la batalo – laŭdire okazinta en Civaux – dum kiu la frankoj de la reĝo Klodvigo venkis la vizigotojn de Alariko la 2a, pluvis sarkofagoj sur Civaux por akcepti la kadavrojn de la frankaj militistoj mortintaj dum la batalo. Tiu legendo longe nutris la lokan imagon. Ĉi-tiun gravan nekropolon oni pli verŝajne devas rilatigi al la religia centro, konsistinta el la preĝejo kaj baptejo, situanta meze en la vilaĝo, kaj al la kulto de la sanktuloj, tre grava en tiu epoko: Gervazo kaj Protazo. La homoj venis por esti enterigitaj en sankta loko kun la espero iri pli facile en la paradizon. Tion oni nomas sepultejo *ad sanctos* (ĉe sanktuloj). »

« La nekropolo konservas plurajn centojn da sarkofagoj de la 6a ĝis la 8a jarcentoj. Iuj ankoraŭ situas samloke kaj aliaj estis reutiligitaj por formi la

ĉirkaŭbarilon starigitan jam en la 18a jarcento. »

« La sarkofagoj, trapezformaj, estas ĉizitaj el iu loka kalkŝtono. La kovrilojn plejparte ornamas desegnotemo nomata « kun tritransversaĵoj », kiu oftas sur la tiamaj piktaviaj sarkofagoj. »

2013

Kirko de Nia Sinjorino en Bouresse

En 2013 la tradukada staĝo ligiĝis al turismo pere de flugfolio pri la loka romanika kirko de Nia Sinjorino, kies plejparto datiĝas de la 11a kaj 12a jarcentoj.

« En 1433 dum la malsekura etoso de la Centjara Milito, Karolo la 7a permesis al la Abato de Nouaillé fortikigi la kirkon de Bouresse. Efektive la abato de Nouaillé « devas helpi kaj protektadi » la loĝantojn de Bouresse, por ke ili « rezistu kontraŭ militistaj rabistoj ». Siaflanke la loĝantoj devis « gvati kaj gardi la konstruaĵon ». »

« Tiu ĉi fortikigo de la kirko apartenis al evoluo, ne malofta en tiu epoko, ĉefe kiam mankis proksima kastelo. Tiam la preĝejo iĝis rifuĝejo por la loĝantoj de la vilaĝoj. »



En vilaĝa restoracio. (Foto B. M.)

La urbo Poitiers mezepoke

Ni ankaŭ tradukis la vikipedian artikolon pri la urbo Poitiers kaj tio kondukis nin al tre interesa vizito de tiu altnivela loko por la franca kulturo. Per Grand'Rue ni komencis nian viziton. Kial ? Ĉar « temas pri la plej malnova spuro de stratnomo konservata en

Eŭropo. Tiu ĉi strato respondas al la malplej dekliva kaj do malplej laciga vojo, por supreniri de la travadejo (nuna ponto) Saint Joubert al la altebenaĵo. Tiu itinero originas el la Fer-epoko. Kun pli malpli orient-okcidenta direkto, ĝi funkciis kiel dekumana akso en la ortangula aranĝo de la stratoj en la romia epoko. »

Iom maldekstre logis nin la preĝejo Sankta Radegondo, kie haltas multaj pilgrimantoj survoje al Sankta Jakobo, por kulti la relikvojn de la sanktulino. Aparte emociiga estas la historio de tiu sanktulino naskita kiel princino ĉirkaŭ 520 en Turingio (Erfurt), rabita kun sia

frato Hermanfred, je la aĝo de 11 jaroj, fare de la franka reĝo Klotario. Kaj plurajn jarojn poste ŝi devige fariĝas la kvara edzino de Klotario. Kiam tiu lasta murdis ŝian fraton Hermanfred, ŝi fuĝis por fariĝi monaĥino kaj fondis la abatejon de Poitiers.



Staĝantoj trinkas bieron en Grand-Rue, Poitiers. (Foto N. M.)

Longe ni ĉirkaŭpaŝis la imponegan katedralon Sankta Petro kaj ĝuis ĝian internan reĝan etoson. Sed ja la plej bela arkitekta juvelo vidita dum tiu vizito estas la baptejo Sankta Johano, la plej antikva kristana monumento de la urbo. La centra parto datiĝas de 360 kaj ĝia arkitekturo ankoraŭ memorigas la romian arkitekturon.

Se la porturistaj vidindaĵoj ĉirkaŭ Bouresse aparte logas, ni tamen ne tradukas nur turistajn informojn en la tradukstaĝoj de Kvinpetalo. Tute ne, la tekstoj varias de simplaj ĵurnalistaj artikoloj al pli sciencaj, kaj ni foje ekzercigis al literaturaj tekstoj kiel ekzemple pecoj de *Infanaĵaj rememoroj* de Claude

Michelet (2010) aŭ eltiraĵo de *La Seruristo* de Tonino Benaquista.

Sed ne nur okazas tradukstaĝoj en Kvinpetalo. La lingvaj kursoj diversnivelaĵ estas la plej oftaj, sed oni povis staĝi pri ĝardenumado, pri turismo, pri muziko kaj lastsomere pri botaniko.

Promenadoj en la naturo kaj tra Vikipedio, aŭgusto 2013

Ni kvinopis la 12an de aŭgusto por malkovri la naturon sub la gvidado de Alain Favre, fungologo. La vetero tro sekis por trovi fungojn sed ni vizitis diversajn naturmediojn, irante de heĝo kaj arbaro al du riverbordoj divers-

aspektaj : unue ni promenadis borde de la rivero Vieno sub la ombro de altaj arboj, la herboj densis, multsis la ekvizetoj, abundis grimpaĵoj kaj lianoj kaj poste en la valo de rivero Gartempe komence de *Massif Central*.

Granitŝtona kun acida grundo, tiu ĉi valo male estas pli roka kaj pitoreska. La lastan tagon ni esploris la ĝardenon de la Kvinpetalo en la ĉeesto de ties prizorganto, Bernard Lagrange. Pri manĝeblaj plantoj ni multe babilis.



Serĉante specimenojn. (Foto B. M.)

Ni promenadis matene kaj aŭskultis prelegojn posttagmeze. La unua prelego informis nin pri la naskiĝo, historio kaj la koncepto de Vikipedio, kie la lingvo Esperanto havas bonan pozicion. En la postaj tagoj, post la diversaj prelegoj, ni korektis aŭ verkis artikolojn por Vikipedio helpate de Alain. Ni ĉiuj entuziasmiĝis kaj intencis daŭrigi tion hejme.

Nomenklaturado

Alain ankaŭ tre interese prelegis pri nomenklaturado : Kiel doni nomon al biologia unuo nomita *taksono*, kiu donis la terminon *taksonomio*, scienco, kiu priskribas la estulojn. Ĝin komplet-

igas alia scienco, *sistematiko*, grupigo de *taksonoj*.

Carl von Linné, Linnaeus en la latina, Lineo en Esperanto (1707-1778) donis la bazojn de sistematiko. La vivantoj estas klasigitaj laŭ la sekvaj niveloj :

regno, divizio, klaso, ordo, familio, genro, specio.

Ekzemploj : La vorto *ĉevalo* venas el la specio, *homo* el specio kaj genro, *boleto* el genro kaj familio dum vorto *terpomo* estas specio.

Camelus (kamelo) (genro) havas 2 speciojn : *Camelus dromedarius* (1-ĝiba), *Camelus bactrianus* (2-ĝiba).

La internacia lingvo por nomenklaturado estas la latina sed en Esperanto oni povas ankaŭ krei duvortan nomenklaturon, ekzemple: *Galantus nivalis* estus Galanto neĝborula, *Cantharellus cibarius* esperante diriĝus Kantarelo ovoflava. Jam tiu sistemo estas uzata en Vikipedio.

Difino de grundo kaj vivmedio

Alian posttagmezon ni lernis kiel difini grundon, vivmedion.

Ĝin ni povas dividi difini laŭ tiuj kriterioj:

– *Acideco/alkalineco.*

Ju pli la pH (potenco hidrogena) estas alta des pli la grundo estas acida.

Ju malpli la pH (potenco hidrogena) altas des pli la grundo estas kalka/alkala/baza.

– *Sekeco/malsekeco.*

– *Temperaturo.*

Ekzemplo de ekstreme malseka kaj acida grundo estas torfejo. La plantoj, kiujn oni trovas en torfejoj estas

drozeroj, marĉaj mirteloj, betuloj harozaj/lanugaj, multaj fungoj. La erikejoj, kiuj ne bone konservas la akvon, apartenas al grundo seka kaj acida kaj en ĝi kreskas ĉefe ulekso, eriko kaj genisto. Ekzemplo de ekstreme seka kaj kalka grundo estas gruzejo. Ekzemplo de malseka kaj acida grundo estas kalka marĉo (ege malofta). Mezsekan kaj mezacidan grundon havas la arbaroj.

– *Etaĝoj:*

1. Ĝis alteco de 300 m troviĝas la *etaĝo ebena* (france *planitiaire*), kie kreskas interalie kverko.

2. Ĝis alteco de 300-600 m troviĝas la *etaĝo monteta* (france *collinaire*), kie ankaŭ ĉefe kreskas kverko.

3. Ĝis alteco de 600-1500 m troviĝas la *etaĝo montara, suba kaj supra* (france *montagnard*), kie ĉefe kreskas abio.

4. Ĝis alteco de 1500-2200 m troviĝas la *etaĝo subalpa* (france *subalpin*), kie ĉefe kreskas piceo kaj lariko.



La ĉapelulinoj dum la botanika staĝo. (Foto B. M.)

5. Ĝis la alteco 2200 m troviĝas la *etaĝo alpa* (france *alpin*), kie ĉefe kreskas nana saliko.

Pli alte troviĝas la *neĝa etaĝo* (france *nival*).

Betulo troviĝas je ĉiu etaĝo.

La Centro

La centro estas do mastrumata de Societo Yvonne Martinot (SYM), kiu posedas kvin vilaĝajn domojn kun belaj ŝtonaj muroj el la 18a jarcento kaj plu-

rajn ĉambrojn, ebligante la akcepton de ĉirkaŭ 20 staĝantoj.

Nepagataj deĵorantoj okupiĝas laŭvice pri la kuirado en la centro. Bernard Lagrange, la kasisto, kiu loĝas en la regiono, flegas la ĝardenon dum Claudette, kiu restadas en la proksimeco de Bouresse, regule purigas la centron. Kiel ĉiu simila centro la respondeculoj frontas diversajn malfacilaĵojn: manko de laborforto, financaj malfacilaĵoj ĉar la membrokotizoj ne kovras la kostojn, malfacilo venigi staĝantojn malgraŭ la kvalito de la proponataj staĝoj.



Alain Favre detale ekzamenas planton. (Foto B. M.)

Ĉefe mankas daŭra respondeculo loĝanta en la centro mem. La centro sukcese flegas siajn rilatojn kun la najbaroj. Printempe Interkant' prezentis *Carmen* en la vilaĝa spektakla salono. Lernantoj de la vilaĝo partoprenis en la spektaklo. Dum la aŭgusta staĝo ni aperitivumis ĉe loĝantoj de la vilaĝo, kiuj tre aprezis tiun spektaklon. Kiam Hori Jasuo vizitas Kvinpetalon, li iras

paroli pri Japanio al la infanoj de la lernejo.

Jen kial mi opinias, ke tiu centro en tre kvieta kaj ripoziga etoso, kuraĝe prizorgata de la respondeculoj, forte meritas esti subtenata de la ĉeesto de Esperantistoj.

Fotoj de Nicole Margot (N. M.) kaj Brian Moon (B. M.).



Verkante por Vikipedio. (Foto B. M.)



Vespera manĝo en la korto. (Foto B. M.)

Kvinpetalo 2013 : botanika staĝo



Alain Favre klarigas. (Foto B. M.)



Botanikaj studoj perkomputilaj gvidataj de Alain Favre. (Foto B. M.)